



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 5/78 - 3 febr 1978
Aperas ĉiusemajne

Mendu la revuojn

JUNA AMIKO

BIBLIA REVUO

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69

Ni zorgu, ke la iam atingita favoro kaj subtenado ne perdiĝu

Oberkirch (pp) - S-ro F.W. Poppeck, la nova redaktoro de la revueto "La Migranto", en letero atentigas, ke la internacia Turista Asocio "La Naturamikoj" estas organizo, kiu de post jardekoj praktike uzas Esperanton. Sed pli kaj pli aŭdiĝas inter gvidantaj funkciuloj la opinio, ke Esperanto ja ne ludas tiel gravan rolon, kiel oni supozis ankoraŭ antaŭ jardekoj.

La nova komitato de TANEF, al kiu s-ro F.J. Poppeck apartenas kiel redaktoro de la revueto "La Migranto", havas la zorgon, ke kun la ŝanĝo de personoj en gvidaj pozicioj ankaŭ povus ŝanĝiĝi la ĝisnuna pozitiva sinteno rilate Esperanton. La TANEF-komitato opinias, ke oni devas atentigi la esperantistan publikon pri la valoro de tiuj ne-esperantistaj organizoj, kiuj praktike uzas Esperanton. La esperantistoj zorgu do, ke la iam atingita favoro kaj subtenado ne perdiĝu iutage.

En aldonita manuskripto s-ro Poppeck i.a. skribas: "Sur internacia kampo ekzistas ankaŭ la fakgrupo "Esperanto", konata sub la nomo TANEF (Turista Asocio "La Naturamikoj", Esperanto-Fako). Ĝi eldonas propran modestan organon "La Migranto", kiu kvaronjare aperas. Ĝuste la gesamsideanoj en la komitato de TANEF bezonas la subtenon de la tutmonda esperantistaro, ĉar ili estas la ligilo al la Naturamika Internacio en Zuriko, kiu ne nur volas aŭdi belajn parolojn pri Esperanto, sed kiu volas vidi iajn rezultojn. Same kiel la Internacio de la Naturamikoj ankaŭ la Lokaj Asocioj kaj la lokaj grupoj havas fakgrupojn aŭ almenaŭ fakreferantojn. Ju pli da esperantistoj aliĝos al la Naturamika Movado, des pli facile povas esti, fondi interne de la Naturamikaj grupoj ankaŭ Esperanto-fakgrupojn. Kaj per tio ili ne nur povas montri la valoron de Esperanto por tiu turisma organizo, sed ni povas eĉ pli facile varbi en la lokaj grupoj por Esperanto kaj ricevi por tiu laboro eĉ financajn subtenojn. Sed pri ĉio la esperantistoj grandparte ne konscias....."

La kvaronjara organo "La Migranto" bezonas abonantojn en multaj landoj, la lokaj naturamikaj grupoj bezonas esperantistajn membrojn, kiuj aktive laboras en ili. La turismo estas vasta kampo kaj esperantistoj povas komune labori. Kiuj deziras pli detalajn informojn pri la Naturamika Movado aŭ specimenan numeron de la revuo "La Migranto", bonvolu turni sin al la internacia fakreferantino por Esperanto, s-ino Erna Döring, Spalenvorstadt 7, CH-4051 Basel, Svislando."

Invito al la Nigra Arbaro

Unterkirnach (pp)- Esperanto-Grupo Unterkirnach invitas al Nigraj-Arbaraj Migradotagoj de la 4-a ĝis la 7-a de majo 1978. Inter alioj kaj valoj en St. Georgen-Oberkirnach, najbare de Triberg, Furtwangen kaj Villingen-Schwenningen apud la junuldomo "Schlempen" situas ties apuddomo "Kasperhäusle".

Ĉiujn informojn donas S-ro Bernhard Eichkorn, pastro, Kirchplatz 4, D-7731 Unterkirnach.

La kostoj estos 20 GM potage (tranoktado kaj manĝoj.) Familioj estos tre bonvenaj. Infanoj ĝis 6 jaroj estos senpagaj!

Infanoj tute ne ĝenas. Aliĝu do kaj venu, kun kaj sen infanoj!

Pri Bulgario kaj la 63-a UK en Varna

Sofio/Rotterdam (pp) - Laŭ la 3-a Komunikilo de la UK ĝis la 10-a de januaro 1978 jam aliĝis al la 63-a Universala Kongreso de Esperanto en Varna 1 024 gekongresanoj. Ĝis la 31-a de marto validas la kongreskotizoj de la dua periodo. Do, profitu la rabatitan kongreskotizon kaj aliĝu ĉe la konataj perantoj aŭ rekte ĉe Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015.BJ Rotterdam, Nederlando.

El "Bulgario - Turisma Informo", januaro 1978 ni citas:

Konekse kun la 63-a Universala Kongreso de Esperanto kaj la 34-a U K de la Esperanto-Junularo, kiuj okazos en Bulgario en 1978 j., Balkanturist presigos en Esperanto faldfoliojn: Rondvojaĝo tra Bulgario", "Sofia", kaj "Zlatni Pjasaci", ankaŭ la reklamafiŝojn: "Sofia nokte", "Zlatni Pjasaci" kaj "Rilski Manastir". Estos sonigitaj en Esperanton la filmoj: "Tra Bulgario", "Sofia" kaj "Bulgara Somero". La Esperantistaj organizacioj, kluboj k.a. adresu siajn petskribojn ankaŭ per nia bulteno. La adreso de la Bulteno: CENTRO DE TURISMAJ Eldonoj, str."Trijadica 4, BG-1000 Sofia-C, Bulgario.

Gajaj Tagoj kun humuro

De la 1-a ĝis la 7-a de aprilo 1978 en Sofio estont okazigitaj "Gajaj Tagoj". La Sofiaj esperantistoj ligas tiun renkontigon kun la 1-a de aprilo - tago de la ŝercoj kaj la humuro. La programo antaŭvidas vesperon dediĉitan al la humuro, humura spektaklo en Esperanto, ekspozicio de karikaturoj k.a.

Kongreso de Mondcivitanoj

Roubaix (pp) - S-ino Manjo Vilhelm-de Jong, sekretario de Lille-Esperanto, informas: Kia energio? Por kia mondo? Jen la grava temo de internacia kongreso, kiun organizas la mond-civitanoj en la Pacodomo de Roubaix, de la 13-a ĝis la 15-a de majo 1978. Esperantistoj, mond-civitanoj aŭ ne, estas bonvenaj.

Informas S-ro Louis Bourdon, Pacodomo, 50, rue Dammartin, F-59100 Roubaix, Francio.

Por Esperanto-stratoj

Saarbrücken (pp-sel) - Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL) ĵus turnis sin al ĉiuj komunumaj estraroj en Sarlando proponante al ili la inaŭguron de Esperanto-strato aŭ Zamenhof-strato. Atentigante pri la ekzemploj en la tuta mondo SEL proponis kiel konvenan daton de inaŭguro la Eŭropan Esperanto-Kongreson en Saarbrücken, je pentekosto 1979.

Por ekvilibro inter oriento kaj okcidento

Saarbrücken (pp-sel) - Lige kun la sciigo, ke Radio Moskvo komencos disaŭdigi en Esperanto, Sarlanda Esperanto-Ligo sin turnis al la intendanto de Sarlanda Radio petante enkondukon de Esperanto-elsendoj por ekvilibrigi la situacion inter orientaj kaj okcidentaj landoj.

Triksini gvidos kurson

Niederwürrzbach (pp-sel) - La konata luksemburga Esperanto-aganto, Pastro H. Kindler-Triksini, ĵus akceptis gvidi la kurson A (por komentantoj) en la kadro de la 11-a Kultura Semajnfino de SEL de 5-a ĝis 7-a de majo 1978. La kurson C gvidos Reto Rossetti (pri stilistiko de Esperanto).

NATURISTOJ - NUDISTOJ Aliĝu al I N O E (Internacia Naturista Organizo Esperantista)

Bv. peti informojn kaj aliĝilon ĉe

H. Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, F R Germanio

La semajna komentario

La 27/28-an de januaro la Esperanto-elsendoj de ORF, Radio Vieno, prezentis jenan komentario de d-ro Werner Schmidt. Legis ĝin d-ro Karl Beckmann kaj Emil Vokal:

"Hodiaŭ ni ne plu parolu pri nia certe ankoraŭ aktualega problemoj, ĉu la ekfunkciigo de la unua, nun finkonstruita, aŭstria atom-energiejo okazu baldaŭ, aŭ iam estonte, aŭ eble tute ne. Ĉar preparolindas multe pli la ŝoka konstato, kiun faris en televida intervjuo la viena sociologo Ernst G e h m a c h e r.

Ridete li pruvis statistike, sociologie, kaj eĉ politike, la iluziecon, malverecon de la tiom fervore disvastigita, jam populara tezo, ke Aŭstrio estas s o c i a l a ŝtato.

Li cedis, ke Aŭstrio estas ŝtato de sekureco, tio estas, ke neniu en Aŭstrio pruveble suferas plu pro malsato aŭ malvarmo. Sed kial ni rangas pinte en la listo de la alkoholkonsumantaj nacioj kaj en tiu de la memmortigemaj? Kial ni fortrudas la maljunajn, la blindajn, la invalidajn homojn en aŝilojn, kial niaj social-asekuristoj ne rajtas kuracigi senpage ankaŭ siajn psikajn problemojn - kaj tio en la hejmlando de Sigmund F r e u d!

Falis do la socialisma masko, kiun niaj "patroj de la patrio" bele pripentradis kaj poluradis dum tri jardekoj. Ni rekonu, aliflanke, ke la sociologo Ernst G e h m a c h e r faris sian akran analizon komisiite de ĝuste nia socialista registaro mem, kiu antaŭ sep jaroj anoncis forigon de ĉiu sociala mizero.

Estis ĉiukaze urĝa tempo, ke politikistoj kaj sociologoj laŭte ekparolis pri tiuj problemoj, ĉar la viktimoj mem ne plu volas aŭ povas - kiel Saint Exupéry iam skribis:

La silentantoj faras malmulte da bruoj."

Alia komentario laŭ "Newsweek International" 9.1.78 kaj aliaj gazetoj

Tradukisto perdis la orientigon

Neniu rakontas ŝercon, ĉu polan, ĉu alian. Kial do aŭdigis ridoj en la ĉeestantaro, kiam Prezidento Carter plej serioze kaj varme ekparolis pri la polaj-usonaj rilatoj? Estas pro tio ke la pola lingvo uzata de la interpretisto Steven Seymour aspektis iom "rustiĝinta".

Ekzemple, la Prezidento diris, ke li ekflugis la saman tagon el Usono. Sed la tradukisto de la Stat-Departemento libere adaptis: "Kiam mi (definitive) forlasis Usonon". Poste, Carter asertis: "Nia nacio fondiĝis...." En la pola lingvo, tio erare fariĝis "Nia nacio teksigis". Kaj Prezidenta aludo pri polaj esperoj por la estonto fariĝis "Viaj avidaj planoj por la estonto...."

Kiam Carter parolis pri "ideologiaj etiketoj" Seymour interpretis abrupte per "ideologiaj sensignifaĵoj". Plurfoje, Seymour neatendite uzis rusajn vortojn anstataŭ polaj. Polo diris: "Li uzis arkaikaĵojn, vortojn kaj strangan gramatikon, same kiel neinstruitaj kamparanoj."

Kompreneble, la Poloj mokis pri la tuta afero. "Efektive, estis komike" agnoskis varsovia ĵurnalisto. "Sed ni ne ofendiĝu pro tio!" Tamen, la usona ministerio juĝis la okazaĵojn pli serioze. Seymour estas sendependa interpretisto, kun taga salajro de 150 dolaroj. Li lernis la polan kaj la rusan hejme, sed oni devis tuj anstataŭigi lin. Ne kapabla usonano, sufiĉe scipova kaj sekura rilate interpretadon, partoprenis en la vojaĝo. Tial, Carter devis peti la servojn de pola civitano por daŭrigi siajn privatajn interparolojn kun E. Gierek.

Laŭŝajne, la incidento ne tro ĝenis la Prezidenton. Li eĉ ŝerce flustris, ke kulpas sia sud-georgia akcento. Sed tio ne estas la kialo, ĉar Seymour devis traduki la dirojn de Carter laŭ antaŭpreparita teksto.

Tradukis Triksini

Esperanto en Radio

Programo de la Esperanto-elsendoj

Ciutage

Varsovio

6.00—6.30 horo 41 m, 49 m, 75 m, 200 m

16.30—16.55 horo 25 m, 31 m, 41 m
22.30—22.55 horo 41 m, 49 m, 200 m

Novajoj, komentarioj, raportoj, Esperanto-rubrikoj, koncerto kun bondeziroj. Programfolio senpage havebla!

Adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P. O. Box 46, PL-00-950 Warszawa 1, Pollando

Dimanĉe

Vieno

6.45—6.55 horo 48,74 m; 41,38 m; 16,82 m

Komentario, kulturaj raportoj, leterkesto

Adreso: ORF, Esperanto-Redakcio, A-1136 Wien, Aŭstrio

Varsovio

6.50 horo 41 m, 49 m, 75 m, 200 m
Kvinminuta Esperanto-anguleto kadre de la germanlingva programo de Pola Radio (komenco 6.30 horo) kun Esperanto-informoj, ofte ĉerpitaj el Pilo-Press

Sofio

9.30—10.00 horo 31 m

21.05—21.30 horo 49 m

Sciigoj el Bulgario, popola muziko
Adreso: Radio Sofia, Esperanto-Fako, Sofia, Bulgario

Varsovio

17.50 horo 41 m, 49 m Ripeto de la Esperanto-anguleto kadre de la germanlingva programo (komenco 17.30 horo)

Romo

21.00—21.20 horo 41,15 m; 41,24 m; 49,92 m

Novajoj el Italujo, Esperanto-Kuriero, leterkesto. Programfolio senpage!

Adreso: Radio Roma, Esperanto, C. P. 320, I-00182 Roma, Italujo

Radio Vatikana

21.05—21.15 horo meza ondo
1529 khc; mallongondo 6190 khc, 7250 khc, 9645 khc.

Liturgia penso, informoj el la eklezia vivo, intervjuoj, leterkesto. Programkajero senpage!

Adreso: Radio Vaticana, Redazione Centrale, Esperanto, Città del Vaticano

Varsovio

20.30 horo 41 m, 49 m, 75 m, 200 m Esperanto-anguleto kadre de la danlingva programo fine de la duonhora programo.

Varsovio

22.20 horo 41 m, 49 m Ripeto de la Esperanto-anguleto kadre de la germanlingva programo (komenco 22.00 horo)

Lunde

Svisa Kurtonda Radio

19.00—19.10 horo 31,46 m; 48,66 m; 75,28 m Felietonoj pri svisaj kaj Esperantaj temoj. Programfolio senpage!

Adreso: Svisa Kurtonda Radio, Esperanto, CH-3000 Bern 15

Marde

Varsovio

16.00 horo 49 m, 75 m, 200 m Esperanto-anguleto kadre de la svedlingva programo fine de la duonhora programo.

IBRA-Radio

21.30—21.45 horo 48,62 m prelego pri kristana temo

Adreso: IBRA-radio, Box 396, S-101 25 Stockholm, Svedio

Svisa Kurtonda Radio

22.35—22.45 horo 31,46 m; 48,66 m; 75,28 m

Ripeto de la lunda elsendo

Merkrede

Svisa Kurtonda Radio

19.00—19.10 horo 31,46 m; 48,66 m; 75,28 m

Felietonoj pri Esperanto-temoj

Ĵaŭde

ORF Regiona Programo

18.50—18.55 horo 89,9 m (ultrakurtondo)

Esperanto-informoj germanlingvaj kaj Esperantaj

Adreso: ORF Regional, Esperanto, A-1136 Wien, Aŭstrio

Svisa Kurtonda Radio

22.35—22.45 horo 31,46 m; 48,66 m; 75,28 m

Ripeto de la lunda programo

Vendrede

Svisa Kurtonda Radio

19.00—19.10 horo 31,46 m; 48,66 m; 75,28 m

Ripeto de la merkreda programo

Pekino

21.00—21.30 horo 43 m, 33 m, 31 m Informoj, raportoj el ekonomio, kulturo, politiko, muzikajoj.

Adreso: Radio Pekino, Esperanto, Pekino, Ĉinio

Zagrebo

00.05—00.20 horo 264 m

Informoj el Jugoslavio, raportoj, Esperantotemoj, leterkesto.

Adreso: Radio Zagreb, Esperanto-Fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio

Sabate

Vieno

17.45—17.55 horo 48,74 m; 19,86 m Detalojn vidu ĉe la dimanĉa elsendo!

Pekino

21.00—21.30 horo 43 m, 33 m, 31 m Vidu la vendredan elsendon!

Svisa Kurtonda Radio

22.35—22.45 horo 31,46 m; 48,66 m; 75,28 m

Ripeto de la merkreda elsendo!

Noto: La horoj estas indikitaj laŭ mezeŭropa tempo (MET)!

Abonu kaj legu

JUNA AMIKO

Internacia lerneja revuo, aperas trifoje jare.

Jus aperis n-ro 2/77

La revuo taŭgas ankaŭ por komencantoj kaj progresintoj.

Jara abonprezo 5,-- GM

10 diversaj ekzempleroj el la jam aperintaj numeroj kostas 10,- GM

BIBLIA REVUO

Trimonata internacia gazeto pri bibliaj kaj orientaj studoj

Jus aperis n-ro 3/77.

N-ro 4/77 baldaŭ aperos.

Jara abonprezo 18,- GM

Mendu la revuojn ĉe

Ludwig Pickel, Libroser-

vo, Postfach 2113,

D-8500 Nürnberg 1

PSchK Nürnberg 819 56-851

Esperanto en Radio

Varsovio. Dum januaro

la Esperanto-Redakcio de Pola Radio ricevis pli ol 340 korespondantojn. La lastan konkurson de Pola Radio, kiu finiĝis la 31.12.77, partoprenis pli ol 6000 personoj. 8 personoj el diversaj landoj gajnis la ĉefpremion. Esperantisto ĉifoje ne estas inter la laŭreatoj.

Zagreb. Dum la pasinta semajno Radio Zagreb priparolis ricevatajn periodaĵojn, inter ili ankaŭ Pilo-Press, kaj respondis al aŭskultantoj.